Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo lundon la 8-an de oktobro 2025 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Harald Rygg kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 25-an de augusto 2025**
La protokolo de la pasinta estrara kunveno aprobiĝis. Ĝis nun neniu respondo de la Nacia biblioteko.

**3. Petoj al Legaco Uhlen**
La 2-an de oktobro la legaca estraro traktis kaj aprobis la kvar petojn de NEL:

- 7 000 kronojn por kursaj anoncoj en 2024 kaj 2025
- 25 600 kronojn por aldonaj kostoj rilate al Norvega Esperantisto en 2024 kaj 2025
- 2 600 kronojn por Operasjon Dagsverk 2024
- 27 000 kronojn por purigo kaj renovigo de Esperantonia

**4. Esperantonia**
NEL jam havas subskribitan kontrakton pri luigado de Esperantonia, sen fina dato. Ĉesigo de la kontrakto eblas per antaŭaverto de tri monatoj (de unu el la flankoj).
La luantinoj povas helpi peri kontakton kun fakuloj pri riparetoj, ekz. de fenestroj. Nenio tre urĝas.

Martin Schäffer, Ĝenerala direktoro de UEA, estos en Oslo 16-20a de oktobro. Oni instigos al la Oslo-klubo aranĝi kunvenon, invitante klubanojn kaj kursanojn.

Claude legas ĉiusemajne la retmesaĝojn de NEL kaj je bezono plusendas al Marianne respondendajn leterojn.

**5. Kunlaboro kun la sveda federacio**
Lars sendis mesaĝon al Ann-Louise Åkerlund el Svedio kaj Peter Wraae el Danio por proponi organizi komunan norveg-dan-svedan retkunvenon. Lars trovos daton.
Oni imagas kunlaboron interalie sur jenaj kampoj: revua kunlaboro, registrado de esperantaj libroj en komuna (sveda) datumbazo, retkursoj kaj parolgrupoj, komuna Zamenhof-festo en decembro.

**6. Retpaĝaro**
Prokrastita.
Oni laboris pri la proponitaj ŝanĝoj kaj faris plibonigojn.

**7. Eventualaĵoj**
Norvega Esperantisto n-ro 3 aperos meze de oktobro

**8. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 19-an de novembro je 20.30.

Protokolis Marianne Lund